# KIEL DIRI TRIMANIERE

## (VIDEOLECIONOJ)

Celata publiko:
Lernintoj de baza kurso de Esperanto.

**Antaŭtaksita kvanto de la videoj: 14**

**Periodeco de la publikigoj: ĉiusabate.**




Li estas Georgo.

Li estas urbanizisto.

Li nomiĝas Georgo.

Li estas specialisto pri urbanizado.

Li estas nomata Georgo.


Li laboras kiel arkitekto de urbo.




Ŝi estas Sinjorino Analia, la patrino de Georgo.

Ŝi estas nomata Analia. Ŝi estas lia patrino.

Ŝia nomo estas Analia. Ŝi naskis Georgon.



| | | |
|---|---|---|
| Li estas nomata **Sinjoro Karlo.** Li estas la patro de Georgo. | Lia nomo estas **S-ro Karlo.** Lia filo estas Georgo. | Li nomiĝas **Karlo.** Li naskigis Georgon. |



Ŝi estas Rita.

Ŝi estas dekoraciistino.

Ŝi estas la amatino de Georgo.

Ŝi estas nomata Rita.

Ŝi laboras kiel dekoraciistino.

Ŝi estas la amindumantino de Georgo.

Ŝi nomiĝas Rita.

Ŝi havas la profesion de dekoraciistino.

Ŝia amato estas Georgo.



Ĝi estas
Babiko,
la hundo
de Georgo.

Ĝi nomiĝas
Babiko.
Ĝi estas
la hundo
de Georgo.


Ĝi estas
nomata
Babiko.
Ĝia mastro
estas Georgo.




Georgo



S-ino Analia



S-ro Karlo



Rita


Ili estas plaĉaj homoj.

Tiuj grupanoj estas agrablaj personoj.

La homgrupanoj estas ĉarmaj homaj estuloj.



Georgo




Rita


Ili estas geamantoj.

La du amas unu la alian.

Ili ambaŭ amindumas unu la duan.



S-ino Analia



S-ro Karlo

Ili estas la gepatroj de Georgo.


Ŝi kaj li estas liaj gepatroj.

Ili du estas

la patrino kaj

la patro de Georgo.





Ili estas la gepatroj de Georgo.

Ŝi kaj li estas liaj gepatroj.

Ŝi kaj li estas la patrino kaj la patro de Georgo.



S-ino Analia



Rita


Ambaŭ ili estas boparencoj.

Ŝi estas ŝia bopatrino, kaj ŝi estas ŝia bofilino.

Ili ambaŭ havas boparencecon

Nigeria News on NAIJ.com
Breaking: EFCC files fraud charges ag
Innoson Motors, Innocent Chukwum





Ili estas boparencoj.

Ŝi estas ŝia bopatrino, kaj ŝi estas ŝia bofilino.

Ili ambaŭ havas boparencecon inter si.





Ili estas tre afablaj unu kun la dua.

Li kaj ĝi tre afablas unu al la alia.

Estas multa afableco inter ili ambaŭ.





Ili estas tre afablaj unu kun la dua.

Li kaj ĝi tre afablas unu al la alia.

Estas multa afableco inter ili ambaŭ.

# Organizis: Josenilton kaj Madragoa

